



Komune festi la Novan Jaron

**7a Novjara Renkontiĝo
2008-12-27 ĝis 2009-01-03**



Frankfurto ĉe Majno, Germanio

**Por la kreskigo de Esperantujo
www.EsperantoLand.org**

Bonvenon!

Bele, ke vi venis! Mi deziras al vi tre agrablan semajnon kun multe da interesaj interparoladoj, kun amuziĝo, eble ankaŭ iom da lernado. Ĝuu la renkontiĝon, sentu vin hejme en nia kaj via EsperantoLand-renkontiĝo!

Grandegan dankon mi direktas al Christoph kaj Ines Frank kaj al tuta aro da kunlaborantoj, kies nomojn vi trovas en ĉi tiu kajero kaj en la infana/junula programo! Estis ĉiam denove tre bele vidi, kiel vi ĉiuj laŭ viaj eblecoj helpas por aranĝi la Novjaran renkontiĝon.

Ĝuu vian partoprenon en la sesa NR!

Lu Wunsch-Rolshoven

Kelkaj atentigoj

Manĝoj

Vi povos matenmanĝi en la manĝejo de la 7a horo ĝis la 9a horo; poste eblas en nia kafejo, se vi aŭ iu alia kunportis la manĝaĵojn. Tagmanĝi eblas principe inter la 12h30 kaj la 14a; vespermanĝi eblas inter la 18a kaj 19h30. Vegetaraj kaj nevegetaraj manĝoj disponeblas por ĉiu - prenu laŭ via deziro. Se vi deziras vegetare manĝi, bv. veni relative frue.

Kafejo

Nia kafejo funkcios en la salono "Tero". La plenkreskuloj bv. meti strekojn sur la listo por la trinkaĵoj, kaj fine de via restado bv. pagi al Helmut Klünder (aŭ al Lu). Ĉi-jare la infanoj kaj junuloj ricevos komence bonhavan de po 5 EUR sur strekolisto; de tiu sumo deduktiĝos ilia konsumado. Poste, interkonsente kun la gepatroj, ili povos ricevi plian bonhavan.

Kiun demandi pri kio?

Infana kaj junulara programo, vesperaj programeroj: Christoph kaj Ines Frank

Programorganizado (salonoj, tekniko): Erik Frense, Christoph Frank

Ekskursoj: Beranĝer Malatsion, Betti Maul-Propadovič, Lu Wunsch-Rolshoven

Dormĉambroj, kotizoj: Lu Wunsch-Rolshoven. Pri kotizoj prefere nur ekde la 29a de decembro, post la matenmanĝo (aŭ eble antaŭ la vespermanĝo)

Prelegoj kaj lumbildprelegoj, kursoj kaj laborrondoj (en alfabeto ordo laŭ la superrigardo)

Ankaŭ ĉi-foje Christoph Frank produktis apartan programkajeron por infanoj kaj junuloj. La plenkreskula kajero, kiun vi nun legas, prezentas nur kelkajn el la junularaj proponoj. Se vi ŝatas scii, kien malaperis viaj infanoj, bv. do konsideri la alian broŝuron.

Argentino (Alejandro Cossavella)

Alejandro prezentos per lumbildoj Argentinon kaj speciale la regionon de sia hejmurbo San Carlos de Bariloche en Patagonio.

Bestotrikado (Betti Maul-Propadoviĉ)

Betti ofertas kurson pri trikitaj ludbestoj, pilkoj kaj nanoj laŭ Waldorf-pedagogio (de Rudolf Steiner). Vi bezonas trikilojn (prefere maldikajn, dikeco 2 aŭ 2,5) kaj kongruan triklanon (plej konvenas pura ŝaflano) por la besto de via elekto (ekz. anaso, azeno, blanka urso, bovo, bruna urso, cigno, ĉevalo, drako, elefanto, kamelo, kato, krokodilo, leono, nano, pilko, porko, ŝafo). La triklano estu pli dika ol por trikiloj 2 aŭ 2,5.

Cirklodancoj (Danka)

Laŭ melodioj el diversaj landoj lernos kaj ekzercos tradiciajn dancojn.

EDE (Eŭropo - Demokratio - Esperanto) (Ulrich Matthias kaj Bert Schumann)

EDE estas esperantista politika movado antaŭ la eŭropaj balotoj de 2009. Almenaŭ en Germanio kaj Francio esperantistoj nuntempe preparas sin por partopreni la Eŭropajn Balotojn 2009 per aparta listo. Ulrich Matthias kaj Bert Schumann rakontos pri la stato de la preparoj kaj diskutigos la perspektivojn de tiu agado.

Esperanto en entreprenoj (Philippe Bérizzi)

Aŭ, pli precize: “Rapida instruado de Esperanto por praktika uzado en entreprenoj”. Ne tute malgranda franca entrepreno (Triballat) interesiĝas pri utiligo de Esperanto en kontakto kun siaj eksterlandaj filioj. Estas plano krei fulmkurson por tiuj specialaj bezonoj kaj serĉi taŭgajn instruistojn. Krome oni pripensas proponi similan utiligon de Esperanto ankaŭ al aliaj entreprenoj.

La financa krizo (Ulrich Matthias)

La monda financa sistemo estas komplika kaj, kiel montras lastatempaj spertoj, relative nestabila. Surbaze de profesiaj spertoj el du grandaj financaj konzernoj, Ulrich rakontos pri kaŭzoj de tiu malstabileco, ekzemple la fakto, ke "konsilistoj" pri investado preferas vendi komplikajn financajn produktojn nur pro tio, ke tiuj donas la plej altajn maklerajojn. Li diskutigos ankaŭ eblajn solvojn, ekzemple imposton je financaj transagoj.

Gestolingvo (Isabelle Six)

Isabelle prezentos la gestolingvon de mutuloj kaj instruos kelkajn, ofte amuzajn gestojn.

Herzberg, la Esperanto-urbo (Marika Frense)

Certe vi jam aŭdis pri la urbo Herzberg apud Harc-montaro, kiu antaŭ kelkaj jaroj deklaris sin "Esperanto-urbo". Marika prezentos diversajn aktivecojn de la tiea Esperanto-centro, el kiuj menciindas ekz. klerigaj kursoj por Esperanto-aktivuloj, biblioteko kaj arkivo, instruado en lernejoj, interŝanĝo kun partnera urbo kaj la Eŭropa Esperanto-Kongreso 2009.

Hokil-trikado (Olga Obratsova)

Instruado pri mantrikado per hokilo

Kio estas esperantisto? (Ilja de Coster)

Esperantistoj!? Kiu ili estas? Kion ili celas? Cxu ili celu ion? Kiel interrilatas la Esperanto-movado kaj la Esperanto-komunumo? Jen kelkaj el la demandoj, kiujn la prezento kaj la diskuto celas iom prilumi. Bv. atenti ankaŭ la postan similteman programeron pri "Perspektivoj por Esperanto".

Malstreĉiĝo (Anna Dupéchaud)

La malstreĉiga gimnastiko de Anna certe donos al vi plezuron kaj ĝuon.

La kvar elementoj en la kosmo (Bernard-Régis Larue)

Ekscita momento: La ekspedicio sub la gvidado de ekspertizisto ekvojaĝas al la kosmo. La tasko: eltrovi, ĉu la tero estas la ununura loko, kiu ebligas al homo transvivi... Ĉu ie alie ekzistas akvo, fajro aŭ atmosfero? Pere de lumbildoj Bernard kaj lia teamo vagadas tra la kosmo kun la plej grava demando: se iam nia planedo stiras en naturkatastrofon, ĉu estas imageble por homoj, trovi novan mondon, kiu gastigos nin?

Perspektivoj por Esperanto (Ursula Niesert)

Kiuj estas niaj celoj kaj kiel la Esperanto-movado aŭ komunumo atingu ilin? Jen du esencaj demandoj por Esperanto-agado. Ni planas mallongajn paroladetojn de diversaj homoj por prilumi la temon el diersaj vidpunktoj. - Bv. atenti ankaŭ la antaŭan similteman programeron pri “Kio estas esperantisto?”.

Polonezo (kaj antaŭa ekzerco) (Danka)

Por la komuna danco dum silvestro necesos iomete da ekzerco.

Su-Dghok-Terapio (Viktor Obrastsov)

Kiel montras rigardo en la interreto, la Su-Dghok-terapio (refleksoterapio) estas malmulte konata en okcidento. Jen ebleco sperti praktikan lecionon pri ĝi.

Wikipedio (Yves Nevelsteen)

Wikipedio daŭre kreskas kaj fariĝas pli kaj pli grava por Esperantujo. Aperis nova verko pri ĝi de Ziko van Dijk, kiun Yves prezentos.

Vizaĝomasaĝo (Danka)

Imagu varman manon, kiu agrable glitas super via vizaĝo kaj delikate knedas vian haŭton – ĉu vi certas, ke vi volos rezigni pri tio?

Yumeiho (Bert Schumann)

Bert montros al vi, kiel masaĝi la dorson kaj aliajn korpopartojn laŭ Yumeiho-terapio.

Ekskursoj

En dimanĉo okazos promeno tra Frankfurto, kiu gvidos nin al kelkaj konataj lokoj kiel Römer-monto, Paŭl-preĝejo, Ĉefa Gardejo kaj malnova operejo.

En la 2-a de januaro ni planas tuttagan ekskurson al **Darmstadt** kun vizito de la tiea kvartalo laŭ la konstrustilo “Jugendstil”. Ĉar kutime nur parto de la partoprenantoj emas tuttage ekskursi, ĉi-foje estos ankaŭ iom da programoferto en la domo kaj ekskurso al muzeo, almenaŭ por infanoj kaj junuloj.

Novjaraj promenoj

Ni denove proponas du da ili por bone trakti kaj la malsaman matenan dormemon de diversaj generacioj kaj la malsaman marŝemon: Unu por familioj kun infanoj, pli frua kaj pli mallonga, kaj unu por la aliaj, pli malfrua kaj iom pli longa. Se la vetero estos agrabla, verŝajne la pli longa promeno gvidos nin al la “Schwanheimer Düne”, unika duno okcidente de Frankfurto, proksime de Höchst, kun aparta pejzaĝo kaj plantaro. Alikaze verŝajne okazos promeno laŭ Majno, interalie al la mediteranea parko “Nizza”.

Lingvokurso kaj konversacio

Katalin Kovats ofertas **kurson por komencantoj**. Krome Sylvain Lelarge gvidas **konversaciajn esplorojn**.

Ni decidis ankaŭ ĉi-foje ne oferti apartan kurson por infanoj, ĉar la sperto montras, ke la aliaj ofertoj dum NR estas multe pli allogaj ol tede sonanta lingvokurso. Estos tial kelkaj kursoj, kie infanoj povos konstrui ion kaj la gvidanto iom helpas plukonstrui la lingvaĵon. Infanoj, kiuj estas konvinkitaj pri sia lernemo, kaj la gepatroj povas turni sin al unu el la instruantoj, kiuj certe helpos tiukaze kaj eble aranĝos ion.

Vespera Programo

Interkona vespero

Kun klarigoj pri la programo kaj ĉiutagaj aferoj.

Ludvespero

Ni kaj espereble vi kunportis diversajn ludojn por ebligi tion.

Muzika vespero

Ni esperas kunmeti buntan bukedon el kontribuoj – ĉu eble ankaŭ de vi?!

“Münchhausen – la vera kazo”

Teatra vespero de Christoph Frank; ekde 12 jaroj

Silvestra festo

Interalie kun polonezo, kiun refoje organizos Danko, kaj kvar-elementaj surprizoj

Koncerto de Ale (Alejandro Cossavella)

Internacia kaj adiaŭa vespero

Eble vi ŝatos prezenti ion. Bv. anonci vin ĉe Christoph Frank.